

41 PROCESO DE SINJORO HAVLENA

„Se sinjoro redaktoro komencis jam ĉi tie paroli pri ĵurnaloj," diris sinjoro Beran, „ankaŭ mi rakontos ion al vi: Plej multo de legantoj serĉas en ĵurnaloj ĝuste la procesan rubrikon. Tion neniu scias, ĉu ili legas ĝin tiel diligente pro latentaj krimmemo aŭ pro sia morala kaj jura kontentigo; sed estas nur certe, ke ili legas ĝin pasie. Tial en ĵurnalo iu juĝo devas esti ĉiutage.

Kaj nun imagu al vi, ke ekzemple estas tribunalaj ferioj; tribunaloj estas fermitaj, sed la rubriko El juĝeja halo ne darfis manki en ĵurnaloj. Aŭ ofte ĉe neniu tribunalo estas eĉ unu interesa kazo; kaj la tribunala referanto devas havi ian interesan kazon, li prenu ĝin de kie ajn. En tiaj kazoj devas tribunalaj referantoj elsuĉi ian interesan kriminalan temon simple el la fingro. Por tiaj elpensitaj kazoj ili havas inter si borson kaj ili aĉetas ilin, vendas, pruntas kaj interŝanĝas por dudek cigaredoj aŭ simile. Mi scias tion, ĉar ĉe mia loĝejmastrino loĝis ia tribunala referanto; drinkulo, jes, li estis, kaj malordulo, ankaŭ, sed alie li estis talenta kaj malbone salajrata junulo.

Foje aperis en kafejo, kiun tribunalaj referantoj kutime vizitadis, ia stranga, kaduka, malpura kaj ŝvelpufa ulo; li nomiĝis Havlena, estis nefinstudinta juristo kaj nepre senŝanculo; neniu, eĉ ne li mem, sciis, el kio li fakte vivas.

Havlena, tiu nenifarulo, havis ian neordinaran krimulan aŭ juristan talenton; kiam iu ĵurnalisto donis al li virginian cigareton kaj bieron, li fermis la okulojn, kelkfoje ekfumegis kaj komencis rakonti al li plej belan kaj kuriozan kriminalan kazon, kiun oni povas nur elpensi; poste li citis la ĉefajn punktojn de pledo kaj trafan replikon de ŝtata prokuroro, post kio li anoncis verdikton en nomo de la respubliko. Poste li malfermis la okulojn, kvazaŭ li vekigis el sonĝo kaj murmuris: Pruntu al mi kvin kronojn.

41 SOUD PANA HAVLENY

„Když už tady pan redaktor začal o novinách," pravil pan Beran, „tak já vám něco povím: Nejvíce čtenářů hledá v novinách zrovna tu soudní síň. To nikdo neví, čtou-li ji tak pilně z utajené zločinnosti nebo pro své mravní a právní uspokojení; jisté jenom je, že ji čtou náruživě. Proto musí nějaký ten soud denně v novinách být.

Ale teď si vezte, že máte například soudní prázdniny; soudy jsou zavřeny, ale rubrika Ze soudní síně v novinách chybět nesmí. Nebo často není u žádného soudu ani jeden zajímavý případ; a soudní referent musí mít zajímavý případ, ber kde ber. V takových pádech si teda musejí soudní referenti nějaký ten zajímavý trestní případ jednoduše vycucát z prstu. Na takové vymyšlené případy pak mají mezi sebou burzu a kupují je, prodávají, půjčují a vyměňují za dvacet cigaret nebo tak. Já to znám, protože u mé bytné bydlel jeden takový soudní referent; mazavka, to on byl, a lajdák, to on taky byl, ale jináč to byl nadaný a špatně placený mládenec.

Tedy jednoho času se vyskytl v kavárně, kam ti soudní referenti obyčejně chodili, takový divný, sešlý, špinavý a napuchlý chlapík; on se jmenoval Havlena, byl to nedoštudovaný právník a nadobro ztracená existence; nikdo, ba ani on sám nevěděl, z čeho je vlastně živ.

Tedy ten Havlena, ten flákač, měl takový zvláštní zločinecký nebo právnický talent; když mu některý ten novinář dal viržinku a pivo, zavřel oči, udělal několik bafů a začal mu povídat ten nejkrásnější a nejpodivnější kriminální případ, jaký si kdo může vymyslet; potom uvedl hlavní body obhajoby a vhodnou repliku státního zástupce, načež pronesl jménem republiky rozsudek. Pak otevřel oči, jako by se probudil ze sna, a bručel: Půjčte mi pět korun.

Iam ili faris kun li tian eksperimenton: En unu kunveno li elpensis dudek unu kriminalajn kazojn, unuj superis la aliajn; nur ĉe la dudek unua li ekhezitis kaj diris: Atendu, ĉi tiu kazo estas nek por soljuĝisto, nek por senato, ĝi devus veni antaŭ asizon; kaj asizon mi ne faras. Nome li estis principe kontraŭ la asizoj: Sed tion oni devas lasi al li, liaj verdiktoj estis kvankam severaj, tamen jure modelaj; tion li speciale ŝatis.

Kiam la ĵurnalistoj malkovris tiun Havlena kaj vidis, ke liaj kazoj, kiujn li liveras, ne estas tiel ordinaraj kaj tristaj kiel tiuj vere okazantaj en juĝejo sur Karlo-placo, ili faris kun li jenan kontrakton: Havlena ricevis por ĉiu elpensita kazo tiel nomatan juĝan tarifon, nome dek kronojn kaj virginian cigareton kaj krome por ĉiu monato de puno, kiun li aljuĝis, pluajn du kronojn; vi scias ja, ju pli granda puno, des pli grava kazo. Neniam antaŭe la legantoj de ĵurnaloj tiom ĝuis la procesan rubrikon, nur kiam Havlena liveradis tien siajn fikciajn juĝajn kazojn. Jes, nun la ĵurnaloj jam delonge ne estas tiel bonaj, kiel dum lia tempo; nun estas en ili nura politiko kaj nuraj presprocesoj - mi ne scias, kiu legu tion.

Foje Havlena elpensis la jenan kazon - li havis multe pli bonajn, sed neniu el ili havis sekvojn, sed tiam ĝi krevis. La kazo en la plej konciza enhavo estis la jena: Iu persista fraŭlo ekdisputis kun bonmora vidvino, loĝanta en kontraŭa galerio; post tio li havigis al si papagon kaj lernigis ĝin, kiam ajn la najbarino montriĝos en la galerio, plengorĝe krii: Ci vagabondino! La vidvino akuzas la koncernan sinjoron pro honorofendo. Distrikta tribunalo agnoskas, ke la akuzito kaŭzis al la privata akuzantino pere de sia papago publikan ridindigon kaj kondamnis lin en nomo de la respubliko al dusemajna karcero kondiĉite kaj al kompenso de la kostoj. Mi ricevos dek unu kronojn kaj virginian cigareton, finis Havlena la procesan traktadon.

La kazo de Havlena aperis proksimume en ses ĵurnaloj, memkomprene en varia literatura prilaboro.

Oni s ním jednou udělali takový pokus: Na jedno posedění vymyslel jedenadvacet trestních případů, jeden lepší nežli druhý; teprve při jedenadvacátém se zarazil a řekl: Počkejte, tenhle případ není pro samosoudce ani pro senát, ten by musel přijít před porotu; a porotu já nedělám. On totiž byl zásadně proti porotám. Ale to se mu musí nechat, jeho rozsudky byly sic přísné, ale právnicky vzorné; na to on si zvláště potrpěl.

Když ti novináři objevili tohohle Havlena a viděli, že případy, co on dodává, nejsou tak všední a smutné jako ty, co se opravdicky odehrávají na Karláku, udělali takový kartel; Havlena dostával za každý vymyšlený případ takzvanou soudní taxu, totiž deset korun a viržinku, a krom toho za každý měsíc trestu, co uvalil, dvě koruny; to víte, čím větší trest, tím těžší případ. Jakživi si čtenáři novin tak nepočítli na soudní síni, jako když tam dodával Havlena ty své fiktivní soudní případy. Kdepak, teď už ty noviny nejsou dávno tak dobré jako za jeho času; teď je to samá politika a samé tiskové procesy - já nevím, kdo to má číst.

Tedy jednou si ten Havlena vymyslel tenhle případ - on míval daleko lepší, ale z žádného nic nikdy nepošlo, až tenkrát to prasklo. Případ byl ve vši krátkosti ten: Nějaký starý mládenec se pohádal s počestnou vdovou, co bydlí na protější pavlači; nato si pořídil papouška a naučil ho, kdykoliv se ta sousedka na pavlači ukáže, křičet na ni z plna hrdla: Ty couro! Vdova podá na dotyčného pána žalobu pro urážku na cti. Okresní soud uzná, že žalovaný uváděl soukromou žalobkyni prostřednictvím svého papouška u veřejný posměch, a odsoudil ho jménem republiky k čtrnácti dnům vězení podmíněně a k náhradě útrat. Dostanu jedenáct korun a viržinku, skončil Havlena přelíčení.

Tenhle Havlenův případ vyšel asi v šesti novinách, ovšem v různém literárním zpracování.

En iu ĵurnalo ĝi havis titolon: En kvietaj domoj. En la alia ĵurnalo ĝi nomiĝis: Domposedanto kaj malriĉa vidvino. La tria ĵurnalo titolis ĝin: Akuzita papago. Kaj tiel plu.

Sed subite venis al tiuj ĵurnaloj leteroj de ministerio pri justico: la subskribita ministerio postulas sciigon, antaŭ kiu distrikta tribunalo okazis la proceso pro honorofendo, priskribita en tiu kaj tiu numero de via ŝatata organo; la citita decido pri kulpo de la akuzito kaj same la verdikto estas kasacia kaj kontraŭleĝa, ĉar per la akuziga diraĵo kulpiĝis ne la akuzito, sed la papago; ne estas pruveble, ĉu la diraĵo de la citita papago eksterdube koncernus la privatan akuzantinon; la cititan diraĵon oni ne povas opini honorofendo, sed maksimume grava malkonvenaĵo aŭ publika indignigo, kiun persekuti estus sole eble per polica admono, punpago pro ordo aŭ ordono pri forigo de la citita birdo. La ministerio pri justico deziras konstati, kiu distrikta tribunalo okupiĝis pri la proceso por entrepreni kompetentan enketon kaj tiel plu; kurte, oficiala skandalo.

Jesumaria, sinjoro Havlena, bele vi konsilis al ni, vortatakis poste tribunalaj referantoj sian liveranton. Rigardu ja, via verdikto koncerne la papagon estas kasacia kaj kontraŭleĝa!

Havlena paliĝis kiel muro! Kio, li ekkriis, ke mia verdikto estas kontraŭleĝa? Damne, ĉi tion aŭdacas aserti al mi la ministerio? Al mi, al Havlena? - Onidire neniam antaŭe la ĵurnalistoj vidis tiom ofenditan kaj indignigitan homon. - Mi sapumos iliajn okulojn, kriis Havlena ne regante sin. Mi montros al ili, ĉu mia verdikto estas kontraŭleĝa aŭ ne! Ĉi tion mi ne povas toleri!

Pro aflikto kaj ekscito li surloke ebriiĝis sub la homa digno; poste li prenis paperfolion kaj skribis al la ministerio pri justico ampleksan juran analizon, per kiu li defendis la verdikton; nome, kiam tiu sinjoro instruis sian papagon insulti al la najbarino, ke li evidentigis klaran intencon ofendi ŝin kaj misfamigi; ke ĉi tie estas evidenta dolus; ke la papago ne estas subjekto, sed instrumento de la citita delikto kaj tiel plu;

V jednech novinách to mělo titul: V tichém domě. V druhém listě se to jmenovalo: Domáci pán a chudá vdova. Třetí žurnál to nazval: Žalovaný papoušek. A tak dále.

Ale najednou vám do těch všech novin došel přípis od ministerstva spravedlnosti: že podepsané ministerstvo žádá o sdělení, před kterým okresním soudem se onen proces pro urážku na cti, uvedený v tom a tom čísle vašeho váženého listu, konal; že uvedený nálezný o vině žalovaného, jakož i rozsudek jest zmatečný a nezákonný, jelikož inkriminovaného výroku se nedopustil žalovaný, nýbrž papoušek; že nelze míti za prokázáno, že by se výrok řečeného papouška nepochybně vztahoval na soukromou žalobkyni; že tedy nelze řečený výrok považovat za urážku na cti, nýbrž nanejvýš za hrubou nepřístojnost nebo veřejné pohoršení, které by bylo lze stíhati toliko policejním napomenutím, pořádkovou pokutou nebo příkazem odstraniti řečeného ptáka. Ministerstvo spravedlnosti si přeje tudíž zjistiti, který okresní soud se onou při zabýval, aby zavedlo příslušné šetření a tak dále; zkrátka taková úřední aféra.

Ježíšmarjá, pane Havleno, vy jste nám dal, spustili potom soudní referenti na toho svého dodavatele. Koukněte se, vždyť ten váš rozsudek stran toho papouška je zmatečný a nezákonný!

Ten Havlena vám zbledl jako stěna. Cože, křikl, můj rozsudek že je nezákonný? Krucinál, tohle si mně troufá ministerstvo tvrdit? Mně, Havlenovi? - Jakživi prý ti novináři neviděli tak uraženého a rozhořčeného člověka. - Já jim proženu perka, křičel ten Havlena bez sebe. Já jim ukážu, je-li můj rozsudek nezákonný, nebo ne! Tohle já si nemůžu nechat líbit!

Z lítosti a rozčilení se na tom místě ožral pod obraz bůží; načež vzal arch papíru a napsal ministerstvu spravedlnosti obšírný právnícký rozklad, kterým hájil onen rozsudek: že když ten pán učil svého papouška nadávat té sousedce, dal najevo zřejmý úmysl ji urazit a zlehčit; že tedy je tu patrný dolus; že ten papoušek není subjektem, nýbrž jen instrumentem uvedeného deliktu a tak dále;

koncize, ĝi estis laŭdire la plej brila kaj subtila jura analizo, kiun la ĵurnalistoj iam vidis. Li subskribis JUC. Venceslao Havlena, m.p, kaj sendis ĝin al la ministerio pri justico. Jen, li diris, dum ne estos decidite pri ĝi, mi ne juĝos, unue mi devas ricevi satisfakcion.

Memkomprene, la ministerio pri justico reagis neniel al la letero de Havlena; dume Havlena iradis mishumora kaj indignigita, ankoraŭ pli kadukiĝis kaj eĉ magriĝis. Vidante, ke de la ministerio li ne atingos la respondon, li morniĝis, senvorte kraĉis aŭ havis ribeligajn parolojn, kaj fine deklaris: Atendu, mi montros ankoraŭ al ili, kiu pravas!

Du monatojn neniun lin vidis; poste li venis serena kaj ridema kaj anoncis: Fine estas prezentita kontraŭ mi akuzo! Uf, damna oldulino, ĝi kostis laboron, antaŭ ol mi persvadis ŝin al tio! Oni ne kredus, ke la maljuna virino povas esti tiel pacema; mi devis subskribi paperojn, ke ĉiukaze mi pagos elspezojn al ŝi. - Do, junuloj, nun oni traktos tion antaŭ tribunalo.

Kaj kion? demandis la ĵurnalistoj. Nu, la aferon kun la papago, diras Havlena. Mi diris ja al vi, ke mi ne lasos tion. Sciu, mi aĉetis papagon por lernigi ĝin diri: Ci vagabondino! Ci senhonta oldulinaĉo! Homoj, kiom da laboro ĝi kostis! Dum ses semajnoj mi ne elŝovis piedon el la hejmo, kaj nek diris, nek aŭdis homan vorton krom Ci vagabondino! Nun la papago prononcas ĝin tute bele; sed, besto, ĝi krias ĝin de mateno ĝis vespero: ne kaj ne kutimiĝi krii tion al mia najbarino trans la korton. Ŝi estas maljunulino, muzik-instruistino, el bona familio, ege brava persono; sed ĉar en nia domo estas neniun alia virino, mi devis ŝin elekti por la ofendo.

Aŭskultu, delikton oni facile elpensas, sed fari ĝin, tio estas alia afero. Tiun banditonpapagon mi povis neniel lernigi, ke ĝi insultu nur ŝin. Simple ĝi insultas ĉiun. Mi opinias, ke ĝi faras tion pro malico. Poste Havlena faris egan gluton kaj daŭrigis: Mi superruzis tion alimaniere;

zkrátka prý to byl nejskvělejší a nejsubtilnější právnícký rozbor, jaký kdy ti novináři viděli. Načež se podepsal JUC. Václav Havlena m. p. a poslal to ministerstvu spravedlnosti. Tak, řekl, a dokud to nebude vyřízeno, nebudu soudit; já musím dřív dostat satisfakci.

To se rozumí, ministerstvo spravedlnosti na Havlenův přípis nijak nereagovalo; zatím Havlena chodil otrávený a roztrpčený, zchátral ještě víc, a dokonce se zhubl. Když viděl, že se od ministerstva odpovědi nedočká, zasmušil se, mlčky plival nebo vedl pobuřující řeči, a nakonec prohlásil: Počkejte, já jim to ještě ukážu, kdo je v právu!

Dva měsíce ho nikdo neviděl; pak přišel zářící a naculený a hlásal: Tak už je na mne ta žaloba podána! Uf, zatracená baba, to dalo práce, než jsem jí k tomu přemluvil! Člověk by nevěřil, že může být stará ženská tak mírumilovná; musel jsem jí podepsat lejstra, že jí v každém případě útraty zaplatím: - Tak, mládenci, teď se to projedná soudně.

Co totiž? ptali se ti novináři. No přece ta věc s tím papouškem, povídá ten Havlena. Vždyť jsem vám řekl, že to tak nenechám. Víte, já jsem si koupil papouška, abych ho naučil říkat: Ty couro! Ty babo hambatá! Lidi, to dalo práce! Šest neděl jsem nevytáhl z domova paty a nepromluvil ani neslyšel lidského slova než Ty couro! Teď už to ten papoušek vyslovuje docela krásně; jenomže, vůl jeden, to křičí od rána do večera; ne a ne si zvyknout, aby to křičel jen na mou sousedku přes dvorek. Ona to je taková babička, učitelka hudby, z lepší rodiny, moc hodná osoba; ale protože u nás v domě jiná ženská není, musel jsem si na tu urážku vybrat ji.

Poslouchejte, on se takový delikt lehko vymyslí, ale provést jej, kruci, to je jiná. Já toho rošťáka papouška nemohl naučit, aby nadával jenom jí. Nadává jednoduše každému. Já myslím, že to dělá ze zlomyslnosti. Potom se ten Havlena zhluboka napil a pokračoval: Tak jsem na to vyzrál jinak;

kiam montriĝis la maljuna sinjorino ĉe la fenestro aŭ sur la korto, rapide mi malfermis fenestron, por ke la papago krii je ŝi: Ci vagabondino! Ci senhonta oldulino! - Kaj kion vi dirus pri tio: la maljunulino komencis ridi kaj vokas al mi: Aj, aj, sinjoro Havlena, kian ĉarman birdeton vi havas! Tondro al la oldulino, murmuris sinjoro Havlena. Dum du semajnoj mi devis ŝin persvadeĝi, ke ŝi prezentu akuzon kontraŭ mi; sed atestantojn mi havas el la tuta domo. Nun oni traktos tion juĝe, manfrotis sinjoro Havlena. Diablo devus enesti, se mi ne estus kondamnita pro honorofendo! Tion mi ne donacos al ili, al la moŝtuloj el la ministerio! Ĝis tago de la proceso trinkis sinjoro Havlena kiel ĉevalo, ekscitita, malpacienca. Antaŭ la tribunalo li kondutis ege digne; li diris kontraŭ si mem akran juran parolon, ateste vokis ĉiujn loĝantojn el la domo, ke la ofendo estis indigniga kaj publika kaj proponis plej severan punon. Juĝisto, prudenta maljuna konsilisto, gratis sian barbon kaj deklaris, ke li volus aŭdi la papagon kaj prokrastis la traktadon, ordonante, ke la sinjoro akuzito alportu venonte la cititan birdon kiel pruvobjekton, eventuale kiel atestanton.

Al la sekvinta tribunala traktado venis sinjoro Havlena kun kaĝo kaj la papago. La papago ekokulegis al la timigita fraŭlino protokolistino kaj komencis plengorĝe krii: Ci vagabondino! Ci senhonta oldulino! Tio sufiĉas, diris sinjoro konsilisto. Laŭ eldiro de papago Lora evidentas, ke ĝia diraĵo ne koncernis per rekta kaj eksterduba maniero la privatan akuzintinon. La papago alrigardis lin kaj kriegis: Ci vagabondino! Sed estas evidente, daŭrigis sinjoro juĝisto, ke la koncernan diraĵon ĝi uzas kontraŭ ĉiu persono sen diferenco de sekso. Ĉi tie mankas ofenda intenco, sinjoro Havlena.

Havlena eksaltis kiel pikvundita. Sinjoro konsilisto, li protestis ekscitite, la ofenda dolus estas en tio, ke mi malfermadis la fenestron kontraŭ la sinjorino privata akuzintino tiucele, por ke la papago ofendu ŝin!

kdykoliv se ta stará paní ukázala u okna nebo na dvorku, otevřel jsem honem okno, aby jako ten papoušek na ni křičel Ty couru! Ty babo hambatá! - A co byste tomu řekli: ta babička se začala smát a volá na mne: Jejej, pane Havlena, to máte milého ptáčka! Hrom do baby, bručel pan Havlena. Já do ní musel hučet čtrnáct dní, aby na mne podala žalobu; ale svědky mám z celého baráku. Tak, teď se to projedná soudně, mnul si ruce Havlena. To by v tom musel být čert, abych nebyl odsouzen pro urážku na cti! Já jim to nedaruju, těm vašnostům z ministerstva!

Až do dne přelíčení pil pan Havlena jako holendr, rozechvěný a nedočkavý. Před soudem se choval strašně důstojně; pronesl sám proti sobě britkou právnickou řeč, dovolával se všech obyvatel domu, že ta urážka byla pohoršlivá a veřejná a navrhoval nejpršisnější potrestání. Soudce, takový rozšafný starý rada, se podrbal ve vousech a prohlásil, že by chtěl toho papouška slyšet, a odročil jednání s příkazem, aby pan žalovaný donesl příště řečeného ptáka jako předmět doličný, případně jako svědka.

K příštému roku přišel pan Havlena s klecí a papouškem. Ten papoušek vykulil oči na polekanou slečnu zapisovatelku a začal na celé kolo křičet: Ty couru! Ty babo hambatá! Tak to stačí, povídá pan rada. Z výpovědi papouška Lory je zřejmo, že se jeho výrok nevztahoval přímým a nepochybným způsobem na soukromou žalobkyni. Papoušek se na něho podíval a zařval: Ty couru! Nýbrž je zřejmo, pokračoval pan sudí, že dotyčného výroku užívá vůči všem osobám bez rozdílu pohlaví. Tady chybí urážlivý úmysl, pane Havleno.

Havlena vyletěl jako píchnutý. Pane rado, protestoval rozčileně, ten urážlivý dolus byl v tom, že jsem otvíral okno na paní soukromou žalobkyni za tím účelem, aby ji papoušek pohaněl!

Malfacila afero, diris sinjoro konsilisto, en la disfenestrado estas eble ia dolus, sed per si mem ĝi ne estas ofenda ago. Mi ne povas vin kondamni, ĉar vi malfermadis iam-tiam la fenestron. Vi ne povas pruvi, ke la papago celis la privatan akuzintinon, sinjoro Havlena. Sed mi celis ŝin, defendis sin Havlena. Pri ĉi tio ni havas neniun ateston, oponis sinjoro juĝisto. De vi neniun aŭdis la akuzigan diraĵon. Kion fari, sinjoro Havlena, mi devas vin liberigi. Poste surmetinte bireton li anoncis la liberigan verdikton.

Kaj mi prezentas kasacian plendon kaj apelacion kontraŭ la liberiga verdikto, eksplodis Havlena, ekkaptis la kaĝon kun la birdo kaj galopis for el la juĝejo, furioza, mire ke li ne ploris.

Poste oni vidis lin de temp' al tempo ebrian kaj malesperan. Diru, sinjoro, li plorsingultis, ĉu tio ĉi estas justeco? Ĉu ankoraŭ ekzistas en la mondo ia rajto? Sed mi ne lasos ĝin tiel! Mi prezentos tion al la plej supera instanco! Sinjoro, oni devas min rehonorigi pro ĉi tiu maljustaĵo! Eĉ se mi devus procesi ĝis fino de mia vivo... Mi ne batalas por mia afero, sed por la justeco! Kiel ĝi statis ĉe la apelacia instanco, ne estas al mi pli detale konate; nur mi scias, ke la kompetenta kortumo simple rifuzis apelacion de sinjoro Havlena kontraŭ la liberiga verdikto. Ekde tiu tempo Havlena malaperis, kvazaŭ la tero super li fermiĝis; onidire kelkaj homoj vidis lin sencele vaganta tra la stratoj kiel ombron kaj ion al si murmuranta; ankaŭ mi aŭdis, ke ĝis nun kelkfoje en la jaro venadas al la ministerio de justico ampleksa kaj flamanta plendo in re: ofendo farita de la papago. Sed al juĝejaj referantoj sinjoro Havlena tute ĉesis liveri la kazojn, plej versimile tial, ĉar lia kredo je la justeco kaj la jura ordo estis malfirmigita."

To je těžká věc, řekl pan rada. V tom otvírání okna je snad jakýsi dolus, ale sám o sobě to není urážlivý skutek. Já vás nemůžu odsoudit proto, že jste občas otvíral okno. Vy nemůžete dokázat, že váš papoušek mýnil soukromou žalobkyni, pane Havleno. Ale já jsem ji mýnil, bránil se Havlena. Na to tu nemáme žádné svědectví, namítal pan soudce. Od vás nikdo inkriminovaný výrok neslyšel. Nic naplat, pane Havleno, já vás musím osvobodit. - Načež si nasadil baret a vynesl osvobozující rozsudek.

A já hlásím zmatečnou stížnost a odvolání proti osvobozujícímu rozsudku, vybuchl Havlena, popadl klec s ptákem a uháněl od soudu, rozlícený, že div neplakal.

Potom ho sem tam zahlédli, nalitého a desperátního. Řekněte, pane, vzlykal, je tohle nějaká spravedlnost? Je ještě na světě nějaké právo? Ale já to tak nenechám! Já to poženu k nejvyšší instanci! Pane, mně se musí dostat rehabilitace za tohle příkoří! I kdybych se měl do konce života soudit... Já nebojuju za svou věc, ale za spravedlnost! Jak to vypadalo u odvolací instance, to mně není blíž známo; vím jenom, že příslušný soudní dvůr odvolání pana Havleny do osvobozujícího rozsudku prostě zamítl.

Od té doby Havlena zmizel, jako by se nad ním zem slehla; prý ho někteří viděli, jak bloumá po ulicích jako stín a něco si pro sebe brumlá; taky jsem slyšel, že podnes dochází několikrát za rok na ministerstvo spravedlnosti obsáhlá a plamenná stížnost in re: urážka spáchaná papouškem. Ale případy soudním referentům přestal pan Havlena dodávat nadobro; nejspíš proto, že byla ořesena jeho víra ve spravedlnost a právní řád."